

Numero: 237.
Februaro 2012.

20-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefona: 82/ 410-664
Retadreso: espbel@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Baldaŭ printempo

Ankoraŭ neĝas. Grandaj, blankaj neĝofokoj faladas mute el la griza ĉielo.

Revante mi rigardas la neĝadon. Belega ĉiela fenomeno. La neĝo trankviligas min, sed tamen mi jam deziras la floran printempon, kiam la naturo renaskiĝas. Ĉio estas bonodora, freŝa kaj ĉarma.

Espereble baldaŭ, post kelkaj semajnoj alvenos la printempo. Denove suno brilos, kaj de sub la degelanta neĝo ekaperas kara floreto la neĝborulo, la unua floro de la printempo.

Mi ŝatas aŭskulti la pepadon de la birdetoj. La malfeliĉuloj tiom multe suferis pro la frosto kaj la glacia vento. Nun ankaŭ ili feliĉe trilas adorante la varmajn sunradiojn.

Grandioza estas la printempo, ĝi renovigas nin kaj donas novan esperon por ni.

Estus bone, se ankaŭ kun la naturo ankaŭ la mondo plinoviĝus kaj la homaro ellernus pace vivi unu kun la alia.

Kial estas tiom da militoj, bataloj. Tra la mondo sur diversaj kontinentoj fluas sango, kaj malfeliĉaj homoj mortas pro homa stulteco.

Kiam alvenos la printempo de la homaro, kaj kiam ekfloros la paco de ĉiu homo?

Estus bone scii, ke tio jam estas proksime. La eterna paco alvenos kun la unuaj sunradioj.

Ni kredu kaj esperu, ke tiu ĉi tago estos baldaŭe. La glacio degelos, kaj venos belegaj, sunriĉaj tagoj.

Ni, geesperantistoj klopodas komprenigi, la zamenhofa lingvo estas ilo por simpligi la mondon. Se ni havus komunan lingvon parolata de ĉiu homo, kiel dua gepatra lingvo, tiam la disverslingvanoj povus eviti lingvajn miskomprenojn. Ofte pro la manko de komuna lingvo ni ne komprenas unu la alian, kaj ni pensas pri nia homfrato malbone.

Kiom longe ankoraŭ atendi ĝis Esperanto estu akceptita ĉie tra la mondo?

Espereble kun la varmaj sunradioj ankaŭ tiu ĉi rekono baldaŭ alvenos, kaj ni, homoj estos feliĉaj.

-REDAKTANTO-



Kian lingvon parolu la infano?

La sekvan babiladon mi aŭdis surstrate. Du junaj patrinoj paroladis dum la promeno veturigante kelksemajnajn bebojn per infanĉareto.

--Karulino, mi jam decidis kun mia edzo, se nia etuleto estos pli aĝa, li eklernos la anglan lingvon ka poste la germanan kaj la francan. En nia moderna mondo oni devas scii lingvojn, por ke oni povu labori eksterlande. Sen lingvoscio oni ne povas ekzisti. Ĉu ne?

--Vi tute pravas Elinjo kara, ankaŭ la nia lernos lingvojn. Sed mi ŝatus, se nia karulinjo Anna ellernus krom tiuj ĉi lingvoj ankaŭ la hispanan. Vidu pli ol la duono de la mondo komprenas hispane. En Usono de jaro al jaro kreskas la nombro de la hispanparolantoj. Krome tiu ĉi lingvo tre plaĉas al mi. Ankaŭ mi deziras ellerni ĝin. Kiujn lingvojn vi lernis en la lernejo?

--Mi lernis nur la germanan lingvon kvar jarojn.

--Vere vi perfekte parolas ĝin. Ĉu ne?

--Ne. Tiam mi prefere lernintus angle, sed en nia lernejo oni ne instruis tion. Bedaŭrinde! Min ne tro interesis la germana lingvo. Sed nia etuleto lernos lingvojn.

--Por ke li ne havu lingvajn malfacilaĵojn en la mondo.

--Mia panjo rakontis, ili devis lerni la rusan lingvon devigite en la lernejo. Stulta mondo estis tiu. Lerni la rusan. Sed kial? Kiu parolas nun tiun ĉi lingvon. Neniu. Ĉu ne?

--Jes, jes, sed tamen nuntempe bona profito estas la scio de la rusa lingvo. Mi ĝojus, se mia fileto ellernus ankaŭ ĝin. Vidu, ĉirkaŭ ni estas slavaj popoloj. Kun ili oni povas komuniki per tiu ĉi lingvo. Kiam nia bebo estos plenkreskulo, nur kelkaj homoj parolos ruse en nia lando, ĉar kiuj lernis kaj sciis ĝin, jam estos tro maljunaj aŭ mortis. Kiu scios ruse, tiu estos reĝo, ĉar povos komprenigi sin en tiuj landoj.

--Eble vi pravas. Oni devas scii ankaŭ iun slavan lingvon.

--Ĉu vi rimarkis, lastatempe kiom da ĉinoj estas en nia urbeto?

--Jes. Oni jam aŭdas ĉine parolantojn ankaŭ sur la strato. Eble estus utile eklerni ankaŭ la ĉinan lingvon. Ĉinio jam estas politike kaj ekonomie grandpotenco. Eble iam ĝi superos ankaŭ Usonon.

--Ho, Dio mia kiom da lingvoj estas sur la tero. Niaj beboj, kiom da lingvoj devos ellerni, se ili ne volos perdiĝi en la oceano de la lingvoj. Mi jam morgaŭ ekinstruos al li iun lingvon, sed mi ne scias kiu estu la unua.

-Ŝaŝa-

Perloj

--Ĉu via nomo? – demandis la policisto.

--Georgo Kiss – venis la unutona respondo el la buŝo de la viro – Kial vi demandas, kiam ĝi estas skribita en mia persona legitimilo.

--Silentu! Ĉi tie nur mi demandas. Kio estas la nomo de via patrino?

--Se vi deziras, Maria Ignác. Ĉu ankoraŭ vi deziras ion?

--Ĵus mi diris, tie ĉi nur mi demandas.

La policisto eliris el la ejo. Georgo restis sola en la ĉambro. Dume li rigardis enue la plafonon, kie unu muŝo promenis kapo altere. Se nun li povus fariĝi muŝo, tiam facile tra la fenestro povus eskapi kaj tuj finiĝus tiu ĉi ĝena polica priaŭskultado.

Oni akuzas lin pri la ŝtelo de altvaloraj perloj. Ĝi perdiĝis el la domo de la urbestro. Tiutempe li hazarde estis en tiu strato. La polico ĉiam pensas pri li, se io malaperas en la urbo, kvazaŭ alia ŝtelisto ne ekzistus.

Liaj vestaĵoj jam milfoje estis traserĉita, sed oni ne trovis la perlojn.

Longe okazis nenio. Li restis sola. Sur la plafono la muŝo korzadis tien kaj reen. Subite ĝi ekflugis kaj malaperis tra la malfermita, kaĝa fenestro.

Ekstere estis somero kaj varmis. Treege. Tamen li sopiris la liberecon. Georgo ne sciis, kiom longe li devos resti en tiu ĉi policeja ĉambro.

Kien iris la policisto, kiu pridemandis lin ĝis nun? Kial li estas lasita sola? – Sed li ne ricevis respondon je liaj demandoj.

Li sidis kaj sidis, kvazaŭ skulptaĵo jam depost mil jaroj.

Fine malfermiĝis la pordo, kaj fremda policisto enpaŝis. Li rekte iris al la tablo kaj rigardis la tieajn dokumentojn pri la kazo. Subite li turnis sin al la direkto de Georgo, kaj per rigora voĉo diris:

--Ĉu via nomo?

--Georgo Kiss. Mi jam almenaŭ centfoje diris al vi.

--Silentu, ĉiam parolu nur, se mi demandas vin! Komprenite?

--Jes sinjoro, mi komprenis.

--Bone, diru al mi, sed sincere, kien vi kaŝis la perlojn! Ne mensogu, ĉar tion ni ne ŝatas.

--Kredu min, sinjoro! Mi ne ŝtelis la perlojn. Mi ne scias, kie ili estas.

--Malbona respondo. Mi lasas vin pensadi. Ĝis mi revenos, malkaŝu al mi la lokon de la perloj.

La policisto kiel subite venis, tiel li foriris kaj li lasis Georgon denove en la ĉambro.

Muta silento regis, nur de ekstero aŭdiĝis iom da bruo de aŭtomobiloj el la proksima strateto.

Kiam la policisto foriris, li tuj rigardis al la plafono serĉante la muŝon, sed ĝi estis nenie. Certe ĝi jam estas malproksime aŭ enflugis iun domon kaj serĉis ombron pro la vamego.

Li ne sciis, kiom longe li sidis en la ĉambro. En lia kapo zigzakis diversaj pensoj.

Oni akuzas lin pri la ŝtelo de la perloj. Sed li ne ŝtelis ilin. Kiel prui, ke li estas senkulpa? Neniu kredas lin.

Terure!

Rifuĝi, sed rapide. Li ne deziras sidi en malliberejo longajn jarojn.

La muŝo revenis. Ĝi denove promenas sur la blanka plafono.

Georgo fikse rigardis ĝin kaj ekpreĝis.

Liberiĝi – li ripetadis kaj dume li preĝis al Dio.

Neatendite sur la plafono promenis du muŝoj. Ili pelis unu la alian. La blanka plafono estis granda kaj senfina. Ĝi estis giganta teritorio, kie ili estis nur duope. Du malgrandaj muŝoj.

--La kapito malaperis – muĝis iu sur la longa koridoro, kiu eĥis de lia moĝa kriego – La perloŝtelisto malaperis.

--Kiel? Sur la fenestro estas dika kaĝo densa. Tra ĝi li ne povis eliĝi – diris policisto nerveze. La policisto, kiu lastfoje estis en la ĉambro – La pordo estis ŝlosita. Okazis miraklo. Nur muŝo povintus traflugi la fenestron.

Sur la plafono la du muŝoj indiferece promenadis. Ilin nenio interesis, ĉefe ne tio, kio okazas sube en la ĉambro. Ili vivis sian propran vivon.

Post kelkaj minutoj unu muŝo ekiris al la direkto de la fenestro, la alia restis senmova. Ĝi rigardis sian kunulon, kiu ekflugis kaj flugis al la blua ĉielo. Flugi libere super la urbo estas gandioze. Rigardi la homojn irantajn en la stratoj. La domoj estas malgrandaj, tre malgrandaj.

La muŝo flugis feliĉe.

En la policejo oni renversis ĉiun ejon por serĉi la perloŝteliston, sed li estis trovita nenie. Li malaperis.

La situacio estis freneza. La policistoj kriegaĉis kaj alarmigis la tutan urbon. Nepre ili devos trovi la kaptiton, sed ilia klopodo ŝajnis vane. La perloŝtelisto estis nenie.

La muŝo flugis senĉese super la urbo, ĝis ĝi atingis urborande malgrandan forlasitan domon. Jam depost jaroj ĝi ne estas loĝata. Ĝi flugis tien. La lignopordo estis malfermita. Ĝia malpura plafono estis alloga.

Sekreto, kial la muŝoj ŝatas promeni sur ĝi? Eble tial, ĉar de tie ĉio estas bone vidata.

Post kelkminuta promenado ĝi flugis al olda ŝrankaĉo. Ties tirkesto estis duone malfermita, kaj en la malhelo io ekbrilis, kiel la someraj sunradioj prilumis ĝin.

La muŝo ekscitiĝis kaj ĝia eta korpo ektemiĝis.

--La perloj. Kvin belegaj perloj. Mi estas tre riĉa – ĝi ridetis kaj ĵetis rigardon al la plafono.

La muŝo malaperis. La plafono estis malplena, nur en la policeja ĉambro zumas nervozigante unu tie lasita kunulo la deĵorantan policiston.

-Apáti Kovács Béla-

Poezio

Nova mondo
de Raymond T. ADOKPE

Ĉu mi malkovras novan mondon?
Ĉu vere, ke mi nun estas en nova mondo?
Mi kredas, ke ne; al mi ŝajnas, ke tio ne estas vera.
"Ne, mia infano, temas vere pri nova mondo"
Tiel respondis al mi ege rapide sola arbo portanta
multajn fruktojn.

Kaj mi komprenas nun kaj daŭrigas mian pensadon.
Finfine, jen mi alvenis al la mondo tiom sopirata.
La lingvo ne konas limon.
Ĝi estas la ŝlosilo de la solvo de ĉiuj kvereloj inter
popoloj.

Popoloj, kiuj sin batalas, ĉar lingvoj ilin dispartigas.
Popoloj, kiuj sin atakas, ĉar ili ne komunikas per
samaj vortoj.

Ho! Zamenhof, vi kunigas la homojn de la tuta
mondo.
Ho! Ludoviko, via elpenaĵo estas bonega.
Ho! Lazaro, via lingvo estas vere universala.
Ne nur tiu universaleco rimarkindas en la
komunikado,
Sed ankaŭ la facileco en la konstruoj de frazoj.

Se via intenco povus esti komprenita de ĉiuj,
Ne plu estus flamegoj de militoj,
Eĉ ne fajrero de estontaj flamoj;
Tiam la paco ekregus ĉiam.

Ho, Zamenhof, ĉio estos videbla!
Mia koro estas denove pura;
Ĝi estas montranta al mi novan momenton,
Ke bonega suno nova liberigu la homojn de
nevenkeblaj ĉenoj.

Ho! Amikoj kaj Amikinoj, patroj kaj fratoj kaj
gesamideanoj,
Staru nun kaj luktu ke la pacaj ideoj trakuru la tutan
mondon.

Nun mi komprenas, ke ni estas ĉiuj idoj de la sama

Poezio

prapatro;
Jes, Zamenhof, vi estas tiu prapatro nia;
Ni nun daŭrigu kaj plibonigu vian laboron tra la tuta
mondo.
Uzu ni ĉiujn decajn rimedojn por senlace fari tiun
laboron.

Iam filoj kaj nepoj de la granda Sciencularo haltos
por diri
" Ĉi tie vivis diligentaj disĉiploj, kiuj bonege
laboris"

Ho! Zamenhof, memoro pri vi neniam forviŝiĝos.
Ho! Ludoviko, via donaco estas grandioza.
Ho! Lazaro, la mondo estas dankema al vi.
Mia koro estas denove pura,
Kaj mi vere estas en nova mondo.

Nova erao estiĝas por mi;
La nova suno min liberigos de la nevenkeblaj ĉenoj.
Amikoj kaj amikinoj, patroj kaj fratoj kaj
gesamideanoj,
Staru kaj laboregu por la savo de la tuta mondo.

Estu tiel!!!
Kiel diris iam la ĉefaktoro Lucky DUBE,
Kiu kantis "diversaj popoloj, unu popolo"



Por infanoj



Paroli kun eksterlandano

Min ĉiam interesis la lingvoj. Jam tute junaĝe mi deziris lerni lingvojn.

En iu tago subtegmente mi trovis malnovan, trouzitan germanan lingvolibron. Mi tuj deziris lerni ĝin.

Mi sciis, mia patrino en la lernejo lernis la germanan lingvon. Tiam ĝi estis la devigita lernobjekto en la hungaraj lernejoj.

Mi petis mian patrinon, ke ŝi instruu al mi tiun ĉi lingvon. Mi pensis, ke ĝin mi povos ellerni dum kelkaj tagoj. Tiutempe mi estis tro malpacienca kaj mi ne sciis, ellerni lingvon oni bezonas longan tempon, ofte jarojn kaj nur kelkaj homoj estas kapablaj atingi la lastan celon.

Post mallonga tempo mi volis uzi la lernatan lingvon en la praktiko. En nia vilaĝo ne estis germanoj. Kun kiu mi parolu. Tio estis granda problemo por mi.

Iomete mi seniluziiĝis el la germana lingvo, ĉar mi povis paroli kun neniu. En tiuj jaroj ankoraŭ ne estis televidilo, interreto kaj aliaj ebloj ekzerci la lingvon. La nunaj infanoj nur ŝaltas la televidilon aŭ komputilon kaj jam ni aŭdas fremdan parolon.

Sed la bonŝanco helpis al mi. El Orienta Germanio sportistoj venis al nia vilaĝo. La germanoj loĝis ĉe la vilaĝanoj. Ankaŭ nia najbaro akceptis germanon. Li estis blonda, mezaĝa viro.

Eble mi atendis lin pli ekscitite ol la najbaro. Mi ĝojis, ke mi povos paroli kun germano.

Dum la tuta tago mi kaŝrigardis lin kaj atendis la okazon paroli kun li. Tage li forestis kun la gvidantaro de nia vilaĝo kaj liaj samlandanoj. Oni faris por la gastoj diversajn sportajn kaj kulturajn programojn. Ni, infanoj estis forpeltitaj, se hazarde ni iris tro proksime al ili. Nur de malproksimo ni rigardis ilin.

Sed mi persistis, ĉar mi esperis, finfine mi povos ekparoli en la lernata germana lingvo. Verdire tiam mi sciis nur kelkajn vortojn kaj esprimojn, kiujn mia karega panjo instruis al mi. Tamen mi kredis, ke mia babilado kun li estos rezulta.

Efektive mi jam ne scias precize, kiel okazis, sed fine mi sukcesis alparoli lin. Bedaŭrinde ne estis flua babilado, kiel mi decidis.

Kion diri al li? Tio estis la grava demando. Longe mi cerbumis pri la unua frazo. Mi konfesas, mi estis senkonsila.

Saluti mi sciis diri nur: Bonan tagon! Se tage mi renkontiĝos kun li, tiam ne estos problemo. Sed kion mi faru, se matene kaj vespere alvenos la bonŝanca momento.

Nun jam mi scias, ke mi estintus lerni rapide tiujn ĉi du salutojn, sed mi estis tiom ekscitita, ke mi ne pensis pri tio.

Imagu, tiu bonŝanca momento alvenis en la vesperaj horoj.

Tragedio – mi pensis amare. Mi ne scias dece saluti lin. Se mi ne scias diri la ĝustan salutvorton, kion diri al la simpatia germano.

Mi staris ĉe la ĝardena pordo sur la strato, kaj neatendite la germana gasto ekaperis. Li iris preter mi sola. Laŭ mi li nur promenadis post la vespermanĝo.

Mi ekĝojis kaj timis. Mi ne volis preterlasi la bonan okazon. Nenia senca frazo enmemoriĝis al mi.

Kion diri? Kion diri? Mi tretis de kapo al piedo kaj dume mi timis, ke la germano foriras.

Li jam preskaŭ preteriris min, kiam mi kolektis mian kuraĝon kaj tremante mi elbuŝigis:

--Ĉu vi parolas germane?

Mi ne scias, ĉu mi diris ĝuste aŭ ne? Sed la germano haltis kaj li rigardis al mi ridetante. Mi vidis sur lia vizaĝo surprizon. Li ne atendis, ke knabeto el la najbaro vokos lin.

Ion li diris, sed ĝin mi ne komprenis. Kiel scii, kiam mia germana lingvoscio estis tre malriĉa. Li ankoraŭ foje ripetis, kion kompreneble mi ne komprenis. Mi nur gapis lin stulte.

La germano karesis mia kapon kaj li iris plu. Mi lasis forflugi la eblon babiladi en fremda lingvo kun germano.

Tio estis mia unua komunikado kun eksterlandano. Poste ankoraŭ mi havis okazon, sed ĝi estas la plej neforgesebla.

En la sekvaj jaroj mi eklernis la rusan lingvon. Ĝin mi lernis almenaŭ ses aŭ sep jarojn en la lernejo kaj plurfoje mi komencis renovigi mian germanan lingvoscion. Sed mi konfesas, por mi la plej rezulta estis la lernado de Esperanto, ĉar per tiu ĉi lingvo glate mi povis babiladi ne nur kun germanoj, sed diversligvaj homoj el la tuta mondo.

-Onklo Adalberto-



Belaj bildoj

Belaj bildoj

